Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 13-a de Oktobro 2020

(zom-kunveno)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Juval-Vodevoz, Amri Wandel, Gabi Zeevi. **Gastoj:** Viktor Glejzerov, diversaj eksterlandanoj.

Protokolo *de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.*

1. Raportoj

Amri: "Nicocot" renoviĝas – mi prelegos zome trifoje en mezlernejo, sed sen ekskursoj.

2. Dratverejo (Jehoŝua, Ŝlomo)

a) La mono de la septembra lupago atendas nin ĉe la luantoj.
b) Ni devas plilongigi la kontrakton ekde la 16-an de Oktobro. La lupago estu 3,100 sikloj – tia aldono estas jam en la originala kontrakto. Do, ne estas bezonate verki novan kontrakton.
c) Tamen – necesas subskribigi la loĝantojn sur Apendico (kies malneton skribis kaj montris al la ĉeestantoj Gabi. Ankaŭ Jehoŝua havas unu tian subskribitan el 2012. Ni devas postuli kaj ekkoni ankaŭ veran garantiulon!
ĉ) Estus dezirinde, ke Amos Ŝapira ne veturu tien sola – ĉu estas volontulo el la Estraro? – Ne!
Propono: Amos agu sola post la enfermigo. ***Unuanime akceptita!***
d) Ĉu devas subskribi la Apendicon nur la luantoj, aŭ ankaŭ reprezentanto de ELI?
Eran: preskaŭ certe ne. **Decido**: peti konsilon de la adv. d-ro Ram Modan.
e) **Ŝlomo**: se ni petos evikcion, ne estos bezonate iniciati novan procedon – nur pripagi ĝin.

3. Israela Esperantisto n-ro 169 (Mikaelo)

a) Amri sendos la avizon pri la paperaj aŭ retaj ekzempleroj al la eksterlandaj abonantoj. Se iu ne respondos (kaj ni havas ties retadreson!) – ricevos la retan; la institucioj kiuj kolektas kaj la eksplicitaj petantoj daŭre ricevos la paperan. La adresitoj estos petataj sendi siajn retadresojn kaj bonvole ĝiri nur duonan abonprezon de 5 eŭroj.
b) Mikaelo jam laboras pri la n-ro 170, ĉ. 40 procentoj jam pretas. Amri sendos al li artikolojn: eble resumon de la VK, eble ankaŭ pri la koronviruso, post mallongigo.

4. Zamenhofa Vespero en Decembro (Jehoŝua)

a) **Matilda** laciĝis, ŝia komputilo paneas. Ni devos pensi pri la arta programo.
b) Ĉu la Estraro restu por du jaroj? **Eran**: Jes, tiel la Asocio decidis. Ne estos novaj balotoj!
c) Ĉu ni provu uzi la grandan salonon? Ĉu eblos? Ĉu indos? Ne! – tro multe da demandsignoj. Fine de novembro ni enketu pri tio.

La venonta kunsido: la 10-an de Novembro, 2020, je la horo 20:00 (*zom-kunveno*)
Protokolis: Gabi Zeevi